

# BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO,

*Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista*

redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, Van der Biest-Andelhof,  
Jer. Van Laere kaj Oscar Van Schoor.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)  
Eksterlando . . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)  
Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,  
(rue de la Petite Ourse), Antwerpen  
Anvers.

Abonoj kaj Mensejoj : 20, Vondel-  
straat (rue Vondel), id.

Ĵurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-  
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por  
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

## Farmaciistoj kaj Esperanto

La movado por enkonduko de nia kara lingvo iom post iom ekorganizigas. En la unua periodo de ĝia apero kiun mi nomos la *teoria periodo* oni disvastigis Esperanton ĉie kie oni povis sukcesi ; la ideo de internacia lingvo helpanta kaj ĝies efektiviĝo per Esperanto devis enradikiĝi en la mondon. Iom post iom, kiam tiu komenca laboro sukcesis, oni provis enkonduki nian karan lingvon kaj ĝies regulan uzadon en la teknikon, en la fakajn sciencojn, en la praktikan vivadon. La nunan periodon ni povas tutprave nomi : la praktika periodo.

Jam en multaj fakoj de la tuthomara aktiveco, ni vidis ke Esperanto eniĝis kaj ke ĝi sukcesis jam nun esti granda helpilo por la disvastigo de internaciaj interrilatoj inter samprofesiaj, samfakaj aŭ samcelantaj personoj el diversaj landoj kaj de diversa lingvo kaj nacieco. Ni nur citu la scienculojn, la blindulojn, la instruistojn, la kuracistojn, la dentistojn, la juristojn, la policianojn, la inĝenierojn kaj multajn aliajn profesiojn aŭ movadojn, kiel Ruĝa Kruco, Pacifistoj, militistaro, turismo, komerco, financoj, fervojoj, filatelio, k. t. p. kiuj enkondukis Esperanton kiel praktikan ilon por internaciaj interrilatoj.

Sed ankaŭ jam de kelka tempo, ĉe la farmaciistoj oni eksentis la necescon de internacia helpa lingvo. En la dua Esperanta Kongreso en Genevo, kelkaj diverslandaj farmaciistoj kunvenis por preparoli la eblecon krei internacian Esperantistan Farmacian Asocion, la verkadon de teknika Esperanta vortaro kaj la eldonadon de Internacia farmacia Revuo. Ankaŭ

en la sekvantaj kongresoj de Cambridge kaj Dresdeno ili ree kunvenis kaj en la lasta kunveno en Dresdeno, oni starigis la Internacian Esperantistan Farmaciistan Asocion (I. E. F. A.) Dum la V<sup>a</sup>, en Barcelono okazonta kongreso, la farmaciistoj eĉ aranĝos kongreseton kies programon oni povas legi en la nuna numero de nia ĵurnalo.

Kial Esperanto ne sukcesus ĉe la farmaciistoj? Laŭ nia opinio Esperanto estas utila kaj necesa afero ĉe niaj kunfratoj kaj certege la enkonduko de nia helpa lingvo ĉe la farmaciistoj estas tre ebla.

Mi ĉeestis pli ol unu sciencan kaj farmacia kongreson kie la anoj, kunvenintaj el diversaj landoj kaj mondpartoj ne povis tute bone interkompreni sin; kaj tiamaniere komunikajtoj eble tre interesaj, estis perdataj por la plej granda parto de la kongresanoj. Kio pli facila, kio pli praktika ol unu komuna lingvo, komprenata de ĉiuj farmaciistoj, kiam ili el ĉiuj mondaj partoj kunvenas por preparoli siajn sciencajn kaj profesiajn interesojn?

Antaŭ kelka tempo mi estis ano de la redaktistaro de la farmacia revuo « Journal de Pharmacie d'Anvers ». Nia revuo interŝanĝigis kun multaj eksterlandaj profesiaj revuoj kaj ĉiunmonate ni ricevis ĵurnalojn eksterlandajn eldonitajn en diversaj naciaj lingvoj.

Kiel ofte ni komprenis, per la titoloj de diversaj artikoloj, ke tiuj verkoj estis multege interesaj por ni kaj tial ke ili estis verkita en rusa, pola, sveda, dana, rumana, japana lingvoj, ni povis nek legi nek traduki ilin por komuniki ilian enhavon al la legantoj de nia revuo. Estas certega kaj nediskutebla verajo ke se ni estus povintaj verki rezumon aŭ tradukon de tiuj verkoj por nia ĵurnalo, nia revuo estus fariĝinta multe pli interesa kaj niaj legantoj estus pli bone instruitaj pri la novaĵoj de la scienca kaj profesia tutmonda movado.

Farmaciisto estas homo kiu pro sia profesio estas preskaŭ ĉiam hejme; kompreneble li havas inter la laborado multajn liberajn momentojn kiujn li povas tre profiteme utiligi per lernado de Esperanto, per korespondado kun eksterlandaj kunfratoj, per verko de sciencaj aŭ profesiaj artikoloj interesantaj la tutmondan farmaciistaron. Tiamaniere li fariĝos utilulo por siaj kunfratoj kaj li mem plivastigos sian sciencan kaj trovos en la uzo de Esperanto amuzan kaj profitan tempasadon.

Ekzistas jam en la mondo sufiĉe da Esperanton komprenantaj Farmaciistoj por starigi potencon Internacian Asocion; bedaŭrinde ĉiuj tiuj fortoj estas solaj, ne unuigitaj.

La celo kaj la tasko de I. E. F. A. estas unuigi tiujn perditajn fortojn kaj igi ke la tutmonda farmaciista anaro laboru por la bono de ĉiuj kunfratoj.

Tial ni esperas ke nia alvoko estos represata en ĉiujn esperantaj gazetojn kaj ankaŭ — per la zorgo de nin diverslandaj kunfratoj — tradukita kaj enpresita en la naciajn farmaciajn revuojn, por ke baldaŭ nia I. E. F. A. progresu kaj kalkulu membrojn en ĉiuj landoj eĉ en ĉiuj urboj de la tero. Tiam la farmaciistoj ankaŭ estos pruvintaj ke ili estas homoj progresemaj kaj praktikemaj.

Oscar VAN SCHOOR.

Antverpeno, la 28<sup>an</sup> de Julio 1909.

## La skribsistemoj de l' blinduloj

Dum la Januara monato de l'nuna jaro, la blinduloj kaj tiflofiloj festis en Parizo la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko Braille, kiu, ĉirkaŭ la jaro 1825 verkis la reliefan punktalfabeton por la blinduloj.

Blindulo li mem, kaj lernanto en la blindulejo de Valentin Hauŭ, fondita en la Franca ĉefurbo, li konis per eksperimento la difektojn de la linia littersistemo de la majstro: malfacileco kaj malrapideco por la legado: neebleco por la skribado. Vane Klein kaj Hall estis jam klopodintaj por ĝin plisimpligi, plifaciligi, la rezultatoj estis kvazaŭ nulaj. La jam rimarkinda progreso de la blindulinstruado ĉiutage pli kaj pli montris la necescon de la skribado, kaj de pli rapida legado.

Blindiĝinta oficiro Barbier komprenis, ke, por ebligi la skribon, oni devus anstataŭi la liniojn per punktoj, kaj li verkis originalan punktan alfabeton, kiu tute ne similis al la ordinara alfabeto de l' viduloj estis por tiuj ĉi tute ne legebla. Plie la literoj estis tiel grandaj, konsistis el tiom da punktoj senorde aranĝitaj, ke vere la trovajo ne taŭgis. Sed ĝi enhavis taŭgan principon, kiun elĉerpis la juna Braille kaj kiu lin kondukis al la elverko de la punkta littersistemo, kiu poste devis almiti la blindulmondon. Jen tiu principo tre simpla: la fingro palpas pli facile, pli klare punktojn ol liniojn, jen por la lego; estas pli facile fari reliefe punktojn ol liniojn, jen por la skribo. Post la elĉerpo de tiu principo el la Barbiera sistemo, Braille nur devis ĝin plisimpligi, pliordigi por ke la legado kaj skribado fariĝu pli klaraj kaj pli rapidaj; li plene sukcesis: la plej granda litero konsistas nur el ses punktoj; la aranĝo de la punktoj estas pli regula; la 40 literoj formas kvar seriojn, ĉiu de 10 literoj; la 2<sup>a</sup>, 3<sup>a</sup> kaj 4<sup>a</sup> serioj devenas de la unua per almeto de unu aŭ du punktoj. Krom la 40 literoj estas ebla fari 24 signojn, el kiuj oni kelkajn prenis por la interpunkcio. La ciferoj kaj ĉiuj aritmetiksignoj, kiel ankaŭ ĉiuj la muziksignoj, estas skribataj per la samaj 64 signoj ĉar nenia konfuzo povas okazi.

En la komenco, tiu simpla sed ege taŭga sistemo renkontis akran kontraŭstaron, eĉ en la instituto, kie Ludoviko Braille estis tiam lernanto, iom poste profesoro. Oni riproĉis ĝin pro ĝia malsimileco je la ordinara alfabeto; oni diris: « Anstataŭ ol proksimigi la blindulon al lia vidanta frato, tia skribmaniero estas inter ili vera barilo. » Al tio, la genia eltrovinto, subtenata de multaj el siaj blindaj fratoj respondis tutprave: « Neniam ni povos legi la skribajon kaj presajon de l'viduloj; nur grandpene ni povas silabi reliefan imitaĵon de ĝi, kaj tute ne povas ĝin skribi. Per tia difekt-plena ilo ni ne povas trakuri kun ili ilian inteligent-scienc-kaj artkampon. Kontraŭe, per la punktalfabeto ni kuros, se laŭ malsimila vojo, tiel rapide, kiel ili, kaj ilin retrovos eĉ la atingita celo ».

La Woluwa Blindulinstituto (tiam pliĝuste la Brusela) estas la unua, kiu oficiale akceptis la Braille'an alfabeton en la jaro 1835, dank'al klopodoj de blinda Parlamentano Aleksandro Rodenbach, kunlerninto de Braille. En 1840, ĝin akceptis ankaŭ la Pariza instituto, kie Ludoviko Braille estis tiam profesoro; iom post iom, la franclandaj institutoj imitis la ekzemplon de la ĉefurba, kaj nuntempe, en preskaŭ ĉiuj landoj de l'mondo, la alfabeto Braille sukcesis forpuŝi la diverslokajn skribmanierojn.

La praktikaj rezultatoj de tiu, ŝajne malgrava, eltrovaĵo, estas mirindaj; la blindulo legas tiel rapide, kiel ni, kaj skribas preskaŭ tiel rapide; en ĉiuj landoj ekzistas braille-presiloj, kiuj produktas ĉiujare multmilojn da libroj; multaj revuoj regule eliras ĉiumonate, kaj kelkaj, ĉiusemajne; granda aro da bonkoraj sinjorinoj en multe da mondlokoj, lernis la alfabeton kaj kopias por la blindulbibliotekoj milojn da literatur-kaj scienc-verkajojn; la braille-skribo ege faciligas ne nur la sciencan kaj literaturan studon sed ankaŭ la muzikan kaj aritmetikan. En preskaŭ ĉiuj fakoj la institutoj produktis dum la pasinta jarcento grandnombron da blindaj eminentuloj, kaj tio incitis eĉ la ŝtatestrojn, eĉ privatajn personojn aŭ societojn prizorgi la instruadon kaj edukadon de la ĉiulanda blindularo.

La sistemo de Valentin Hauŭ montris al la mondo la eblecon redoni per instruado kaj edukado la blindulon al la homsocieto; la sistemo de lia lernanto Braille efektivegis tiun eblecon laŭ maniero mirinda, ne antaŭvidita. Al ni, la daŭrigantoj de ilia laboro, la evoluigantoj de ilia kreitaĵo, ĉiam estos karaj iliaj nomoj; kaj, en tiu jubilejaro ni ilin proponas al la danko de la blinduloj, al la miro de l'mondo.

(Daŭrigota).

fr<sup>o</sup> IZIDORO,

profesoro eĉ la Reĝa Blindulinstituto de Woluwe (Bruselo).

## Notinda Atesto.

En la bela hispana revuo: « La Revista Chilena de Historia Natural » eldonata en Santiago de Chili, D<sup>ro</sup> E. Fraga enpresas pri Esperanto la jenajn liniojn, kiujn ni tradukis:

Estas nova ideo kiu, kiel la religio de Kristo, predikas amon de la unuj al la aliaj, universalan pacon kaj internacian fratecon.

La diverslingvajn popolojn unuigos komuna ligilo, potenca, neatakebla: la internacia helpa lingvo Esperanto. Estas lingvo tre facila, logika, fleksebla kaj belsona, kiu estas uzebla por la komercaj kaj sciencaj rilatoj kaj ankaŭ por la poezio.

La Esperantista Scienca Asocio, kies sidejo estas en Genevo, sin nune okupas pri la unuformigo de la teknikaj terminoj pri kimio, fiziko kaj zoologio.

La komerco tre aprobas la profitojn de internacia lingvo kaj la esperanta poezio ĉiutage pliriĉiĝas per belaj kaj novaj verkajoj.

La kongreso de Cambridge kaj la lasta kongreso en Dresden, kies alta protektanto estis la Saksa Reĝo, sciigis al la mondo ke la internacia lingvo, la granda deziraĵo de l'homaro ne estas fantazia produktaĵo, sed ke ĝi estas bela efektivegitaĵo. Dekkvincent kongresanoj parolantaj sume kvardek diversajn lingvojn, interkomprenis sin per unu idiomo, komuna al ĉiuj.

Ĉio tio estus eksterordinara se ĝi ne estis rezultajo de konstantaj penadoj de homoj, kiuj, kiel D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj la estroj de l'Esperantismo dediĉis sian tutan vivtempon al la efektivego de la plej homama el ĉiuj idealoj.

La afero estas granda kaj nobla; tial estas ke ĉiutage la progresoj prigrandiĝas, varbantaj ĉiam miloj da adeptoj.

Unu nura pruvo sufiĉas, ĝi tiel konvinkas ke ĝi tute ne bezonas komentariojn. En 1904 ekzistis 116 esperantistaj societoj; en 1905 ili estis 188; en 1906, 407; en 1907 oni kalkulis 639 tiajn societojn; kaj en Aŭgusto 1908 la nombro de la grupoj atingis 1057.

---

## Malnovaj belgaj kutimoj

### La karnavalo de Benŝo (Binche)

---

Binche (elp.: Benŝ), koketa urbeto de 12.000 loĝantoj, en la provinco Henegauo (Hainaut), kuŝas en ĉarma regiono, plibeligita de multaj kasteloj kaj kampodomoj. Oni rimarkas tie precipe la malnovan preĝejon de S-ta Ursmer kaj la urbdomon, kiu havas antikvan alarmturon kun gaja sonorilaro. La antikvaj remparoj estas restarigitaj, sed de la kastelo, kiu iam estis la restadejo de la regnejstroj, restas nur la ekstera muro kaj

la subaĵoj de la turegoj. Iam la Benŝa punto estis fama, nune la loka industrio estas la fabrikado de ŝuoj kaj vestaĵoj. La urbo estas riĉa en historiaj rememoraĵoj.

La Benŝa karnavalo havas sian devenon en la grandaj festoj, kiujn donis dum la jaro 1540 en sia kastelo de Benŝo, la guberniestrino de la Nederlandoj (Nederlanden-Pays Bas), fratino de la imperiestro Karolo la kvina. Tiuj festoj okazis por glori la de PIZARRO faritan almitadon de Perujo; la korteguloj alivestigis per belaj plumoj; la tiamaj Benŝanoj, kies karaktero estas tre gaja, decidis tion imiti okaze de la sekvonta karnavala mardo. Tiu kutimo dauriĝas ĝis en la nuna tempo, kaj formas karakterizan spektaklon kiu altiras en la urbon de la « Jiloj » (Gilles) grandan aron da vidvoluloj.

La karnavala mardo estas festita en Benŝo kun brilo kiu nenion estas envionta al tiu de la famaj karnavaloj de Romo, Venecio kaj Nico. De la mateno de la « granda tago », vagonaroj intersekvas seninterrompe, kiuj enkondukas en la gajan urbon alfluon da maskigintoj kaj vidvoluloj, tuj miksigantaj en ian premadon de la societoj kaj grupoj kiuj trapromenas la ĉefajn vojojn de la urbo.

Tiuj multkoloraj bandoj kruciĝas, intervokas, interŝanĝas spritaĵojn per ĉarma gajeco kaj koreco. Landsinjoroj el la tempo de Ludoviko XV<sup>a</sup>, Veneziaj muskedistoj, spahioj, Ludoviko-XV<sup>a</sup> lakeoj, ĉiuj dancas antaŭ siaj orkestroj, kiuj ludas popolajn ariojn aŭ muzikaĵojn konformajn je la epokaj aŭ la gildoj kiujn iliaj societanoj riprezentas. Tamburado, akompanita je takta bruo de sonoriletoj, alproksimiĝas kaj kovras la sonon de la muzikoj kiuj ludas tra la tuta urbo.

Estas la « Jiloj » kiuj faras sian mateneliradon en malgranda uniformo. Elegante strangaj estas la Jiloj: je la piedoj ili havas skulptitajn lignajn ŝuojn; ili estas vestitaj per griza kitelo kia preskaŭ malaperas sub la multegaj tre vidkaptaj ornamaĵoj: steloj, puntaj falbaloj ĉe la genuoj kaj manradikoj, puntaj strioj sur la brusto. La kitelo estas, krom tio, parte kovrita per larĝa manteleto lukse puntornamita kaj orfrangiĝita. La zono portas sonoriletojn; fine, vaksa masko kompletigas tiun strangegan ornamaĵon — En malgranda uniformo, la Jilo ne surmetas la ĉapelon, la ĉefan parton de sia kostumo. Estas speco de tiaro farita el pasamento kaj orbrodaĵoj, kaj superigita per grandegaj diverskoloraj strutplumoj. Longaj rubandoj samkoloraj kiel la plumoj formas ĉe tiu stranga kasko kiel ondolinian kolhararon. Tiu ĉapelo kostas multajn centojn da frankoj. Oni ĝin surmetas por la granda elirado kiu okazas je la dua.

Intertempe, la stratoj fariĝas rilate kvietaj; ĉirkaŭ la gasttabloj ordiĝas gajaj kummanĝantoj, kaj oni bone manĝadas atendante la solenan horon de la petolaj saltadoj.

La « Jilo » estas la heroo de la tago; lia nekontraŭdirebla supereco inspiras ian respekton. Ĉar fariĝi « Jilo » ne estas maldelikata plezuro: estas plivole morala kontentiĝo. La Jilo ja eternigas tradicion de multaj jarcentoj; lia rolo estas detale reguligita per la kutimoj: eleganta tualetto, nobla sintenado kaj meĥrespekto; li estas kavaliro, karnavala, kompreneble, sed « sen riproĉoj ». Ĉiu Jilo havas sian lakeon, kiu portas la oranĝojn kaj rebonigas la malgrandajn malordaĵojn de lia tualetto.

Sed jen oni aliras amase al la Granda Placo. Grandega homamaso direktiĝas al la Brusela pordego. Miloj da maskigintoj sin interpremas sur la placo de Battignies kaj en la najbaraj stratoj. Dekses societoj, ĉiuj akompanataj de orkestro, lokiĝas laŭ antaŭdifinita regularo.

Skabeno, ege bonmaniera, tie troviĝas: kun rimarkinda delikateco kaj diskreteco, li prizorgas la regulan formadon de la sekvantaro. La lokaj poliestro kaj policanoj, la ĝendarmoj kaj la organizintoj rajtas ricevi la plej bonajn gratulojn. La homamaso malfermas siajn vicojn, kaj la sekvantaro autateniras al la Granda Placo.

La Benŝaj « Spahioj » malfermas la marŝadon, sekvataj de la « Gajaj Petoluloj » (Gais Lurons) el Ressaix; de la lernantoj de la Benŝa kolegio, kiel « Ludoviko XV<sup>a</sup> Landsinjoroj »; de la Jeumont'aj « Zuavoj » el Jeumont (Franca societo); de « Veneziaj nobeloj » el Benŝo; de la « Braina Junularo » el Braine-le-Comte; de Benŝaj « Muskedistoj », de la « Muzika kaj teatra klubo » el Hal; de « lakeoj Ludoviko XV<sup>a</sup> » kaj « Kamparanoj » el Benŝo: koketaj kamparanoj, kun blanka pantalone, blua kitelo, gantoj, atlasa ĉapelo ornamita per perloj, plumoj kaj ondiĝantaj rubandoj. Fine, 126 Jiloj en kvar societoj fermas la marŝadon. Iia riĉa plumaro superregas el la malproksimeco la multkoloran ondegon.

La sekvantaro alvenas ĉe la Granda Placo jam obstrukciita je homoj: kafejoj, magazenoj, privataj domoj, balkonoj, ĉio pleniĝas; oni sin premas por lasi la vojon por la Jiloj. La tradicia rondanco sin organizas en la mezo; la deksex orkestroj kuniĝas; sub ununura direktado, ili ludas kelkajn plej ŝatatajn muzikaĵojn. Tiel ludado superas la bruegon.

Unue la ario de la « Dudu » Popola kanto de Mons'o (Mons), ĉefurbo de la provinco Henegaŭ'o (Hainaut) —, delikata ĝentilajo por la multnombraj ĉeestantaj Monsaj amikoj. Kia belega gajeco! Tridek mil personoj ĉiurangaj kaj situaciaj dancas, allogitaj per tiu neimagebla viveco. Post la « Dudu » oni ludas lokan arion, « la Benŝa junulo », je l'intenco de la Benŝa junularo, kiu tiel sindone penadas por la sukceso de sia karnavalo. Fine la ario de la Jiloj, je l'honoro de la kavaliroj de tiu tago. Je tiu momento la deliro estas la plej ega.

La urbestro ĉeestas, la urbestro antaŭe. L'antikva kaj eleganta urbdomo, la hoteloj de la Granda Placo, la hompleningitaj balkonoj, formas imponantan kadron.

Tiam la urbestro akceptas la societanojn, kaj prezentas al ili la honorvinon. Poste la societoj disigas en la stratoj, sekvataj de la homamaso. Fenestroj kaj fenestregoj estas provizitaj per protektantaj plektajoj. Pluvo da oranĝoj ekfalas sur la balkonoj. Ĉie maskoj kaj alivestajoj, plejofte elegantaj: silko, atlaso, veluro; ĉie muzikoj, dancoj, saltadoj; ĉie precipe sincera kaj honesta gajeco.

La lumingosekvantaro estas anoncita por la sepa; ĝi estas same ordigita kiel la unua, nur la lumigado estas plie. Centoj da junuloj kiuj portas lumigon kun bengala lumo, intersekvas, post interspaco de unu metro, en duoblaj vicoj laŭlonge de la tuta sekvantaro. La samaj aŭtoritatuloj, ne forlasintaj la lokon, prigardas la bonon ordon, ĉiam je la sama zorgemeco kaj diskreteco.

Sama preterirado, sama rondanco sur la Granda Placo. Elektrikaj radioj, elirantaj el diversaj punktoj, estas projektataj sur la grupoj. Bengallumigoj, elektrikaj arklampo, projekcioj, ĉio estas farita por doni al tiu trairado kiel eble plej grandan brilon. La gajeco estas grandega, la spektaklo magia.

Ŝajnas teatra apoteozo ludita de tridek mil figurantoj sur teatro kiu mezuras kilometron da amplekso.

(Kun afabla permeso de la aŭtoro, el la interesa libro « Le Haut pittoresque, par F. ALEXIS-M. G.

Esperantigis **Maria POSENAER.**

## ESPERANTO FACILA

### PRI PARTICIPOJ

De la apero de sia artikolo pri la akuzativa *n*, (Vidu « Belgia Esperantisto » de lasta Aprilo) la *skribinto* (A) ricevis multajn leterojn kun la peto, praktike klarigi tie ĉi la malsamecon inter la participoj *finigantaj* (B) per *o*, *a*, *e*.

*Ricevinte* (C) tiajn demandojn, li estas tute *konvinkita* (B) pri la malutileco enkonduki ankoraŭ pli da malfacilaĵoj en nian lingvon, eĉ por pliklarigi la sencon.

Por kompreni la *sekvantajn* (B) klarigojn, la *legantoj* (A) devas nepre scii, kia estas la malsameco inter la aktivaj kaj la pasivaj formoj de la participoj, ankaŭ inter la tri ĉefaj tempoj.

#### AKTIVAJ FORMOJ :

	Substantiva finaĵo	Adjektiva finaĵo	Adverba finaĵo
Estanteco :	anto	anta	ante
Estinteco :	into	inta	inte
Estonteco :	onto	onta	onte

#### PASIVAJ FORMOJ :

Estanteco :	ato	ata	ate
Estinteco :	ito	ita	ite
Estonteco :	oto	ota	ote

A. La participoj <sup>\*</sup>finigantaj (B) per *o*.

Tiuj ĉi *estante* (C) ĉiam substantivoj, neniam malfacilaĵo povas ekzisti pri ilia uzado. Ekzemple :

La *skribinto* (A) ricevis... (vidu ĉi supre). — Rigardu ! en tiu festmanĝo estas 200 *partoprenantoj* (A) ; mi ne deziras esti la *pagonto* (A) de tiu ĉi festeno. — La *mortigito* (A) jam estas *enterigita* (B).

Pliege atente oni devas konsideri la diferencon inter la du aliaj participaj formoj.

B. La participoj <sup>\*</sup>finigantaj (B) per *a*,

Tiuj ĉi havas la valoron de ordinara adjektivoj, kiel : bela, granda, blua, dika, k. t. p.

Mi estas *lacigita* (B) de tiu spektaklo... esprimas kvazaŭ la saman ideon al : mi estas *laca* (adj!) pro tiu spektaklo.

Nu, *uzante* (C) « estas », oni ne povas erari, tiu ĉi vorto kutime *antaŭstarante* (C) la adjektivan formon.

Se la *uzataj* (B) participoj antaŭstaras substantivojn, la *uzota* (B) formo estas ankaŭ klare *montrata* (B), la participo *egalvalorante* (C) ankaŭ adjektivan, — kiel en la du unuaj adjektivoj de tiu ĉi frazo mem.

Sed, en aliaj okazoj oni devas ekzameni, ĉu oni povas anstataŭi la participon de adjektiva propozicio *komencanta* (B) per *kiu estas* (i,o) Ekz : La letero, *sendita* (kiu estis sendita) de mia amika al mi, ne estis sufiĉe *frankita* (B) — La Antverpenanoj, *veturontaj* (kiuj veturos) al Verviers haltos in Liège.

C. La participoj <sup>\*</sup>finigantaj (B) per *e*.

Tiuj ĉi participoj estas facile koneblaj pro sia triobla karaktero :

- 1<sup>o</sup> ili estas neŝanĝeblaj ;
- 2<sup>o</sup> ili ĉiam rilatas al la subjekto de la ĉefa propozicio ;
- 3<sup>o</sup> ili estas anstataŭeblaj per dependa cirkonstanca propozicio *komencanta* (B) per : *dum ke, ĉar, tial ke, kiam, post* aŭ aliaj.

La lasta karaktero donas al ni preciozan rimedon por distingi ĉi tiujn participojn de la duaj (B) :

*Paginte* (= post li pagis) unu frankon, la sinjoro (subjekto) havis la rajton eniri la teatron.

*Frapite* (= ĉar ĝi estis frapita) de la infano, la hundo (subjekto) ne volis plu reveni.

*Legante* (= dum vi legas) tiun kanton, vi (subjekto) forgesas vian malfeliĉon.

\* \* \*  
Rimarku !

Tre ofte la uzo de la du formoj B kaj C estas ebla, sed kun malsamaj sencoj. Ekz :

La malriĉulo, *laboranta* (B) la tutan tagon havas nek tempon nek monon por vojaĝi (= kiu laboras eco, kvalito).

La malriĉulo, *laborante* (C) la tutan k-t-p. (= ĉar li laboras = kaŭzo).

\* \* \*  
Por ekzerci sin, oni povas apliki de nun la *donitajn* (B) konsilojn pri ĉiuj frazoj de tiu ĉi artikolo, kie la 3 participaj formoj estas ĉiam *montrataj* (B) per la literoj A, B, C.

Tamen, oni ne forgesu ke en la ĉiutaga interparolado kaj korespondado, la plej praktika regulo estas eviti tiujn formojn laŭeble kaj analizi la ideon, t. e. uzi unu el la tri simplaj ĉefaj tempoj : estanto, estinto aŭ estonto.

Anstataŭ ol diri :

Diru simple :

Mi rekontis amikon de longe ne *viditan* (B). *Aŭdinte* (C) ian bruon... *Vizitinte* (C) mian fraton, mi iris al la hejmo de mia fratino.

Mi renkontis amikon, kiun mi ne vidis de longe. Ĉar mi aŭdis ian bruon... Post mi vizitis mian fraton, mi iris al la hejmo de mia fratino.

SKALDO.

## LA ĈAMBRA ĈASO.

Laŭ J. V. OOSTERWIJK BRUIJN Trad : DREVES UITTERDIJK.

Nobelido, ĉasisto en sia kor'  
Al sia dolor'  
Tre inda estis plendi,  
Ĉar siajn arbarojn kaj sia kastel'  
Ho justa ĉiel'  
Li devis ilin vendi.

Sed por lia koro la plej grava vund'  
Sian bravan hund'  
Kaj laŭtan ĉasan kornon,  
Li prenis urbon kun si for  
Por lasta trezor'  
Jen li hejtos sian fornon.

Jen legis li ĝoje en strato ie ;  
„Luebla ĉi tie  
Meblita apartamento,”  
Kaj tuj li estis decidint'  
Tion vidint'  
Jen vivi en silento.

Kaj jen, la ĉambro kien venis  
Kaj loĝon li prenis,  
Ekscitis liajn nervojn ;  
La muroj kovritaj per granda ĉas',  
Ĉasisto amas'  
Kun hundoj kaj kun cervoj !

Suprizo redonis koloron de sango  
Al lia vango,  
La okazon ne povis li lasi,  
Kaj en lia brusto aperis deziro  
Kun forta eniro  
Por ree gaje ĉasi.

Kaj kun sia hund' li trakuris galope  
La ĉambron duope  
Dum laŭte la kornon li blovis  
Kaj pensis ĉasi en arbar'.  
Kriegis, ĉar  
La ĉasamuzon trovis.

Kaj lia fidela kvarpieda amik'  
Komencis fortik',  
Kontraŭ la cervoj boji  
Kaj ĝia mastro incitis ĝin  
Por des pli sin  
Per ĉasplezuro ĝoji.

Sed el la ĉambro estant' super li  
Resonis kri' :  
» Ĉu volas vi silenti ?  
Ve, via bruego min igos frenez'  
Do estu komplez'  
Kaj ĉesu min turmenti ? »

Sed nea respondo de l' brav' nimrodid'  
Rifuza decid'  
« La plezuron ne volas mi lasi  
En propra salono ĉia foj'  
Kun ena ĝoj,  
Kaj sen malhelpo ĉasi ! »

Li ree ripetis laŭtan brueg'  
 Kaj la hundeg'  
 Transsaltis eĉ la seĝojn.  
 Entuziasmo en la kor'  
 Lin vipis for  
 Sen sekvi domajn leĝojn.

Sed tra la fendoj de l' plafon'  
 Jam tre malbon'  
 Li sentas fali guton  
 De akvo kiu iras tra  
 Kaj kreskas ja,  
 Dronigos eĉ la tuton.


« Vi ĉesu ! » li supren kriegas koler.'  
 « De mia mebler'  
 « Nenio seka restas  
 « Ĉu superplafone de mia loĝejo  
 « Sin trovas banejo ?  
 « Mi malsekega estas ! »

Li vane grumblis, furioze juris,  
 La akvo kuris  
 Sen povi ĝin eviti.  
 Kaj ĉar ĉian provon senfrukte li vidis  
 Li tial decidis  
 La superloĝanton viziti.

Mirego, — jen estas sur planko fendita  
 Mareto jetita,  
 De tiu ĉi pluvo la fonto.  
 La najbaro tamen, sur tablo sidant'  
 Kaj tie estant'  
 Savita sur alta monto.

Trankvile li sidas kun fiŝkapta ŝnur'  
 Kaj respondis nur :  
 « La plezuron ne volas mi lasi.  
 « En propra salon' estas liberaj ni.  
 « Fiŝkaptu mi . . . .  
 « Vi ree ja iru nun ĉasi ! »

(HILVERSUM)



## Humorajoj<sup>(1)</sup>

### Ne Sola

— Ĉu vi sola veturos al la marbanurbo, Sinjorino ?  
 — Ne, mi kunprenos la ĉambristinon, du servistojn, la nutristinon kun la infanoj, miajn hundojn kaj katinajn kaj — mian edzon.

### Ne atendita respondo

Fianĉemulo : Bonvolu diri al mi, Sinjoro, ĉu la mano de via estimata filino estas libera ?  
 Estonta bopatro : Kaj la via, ĉu ĝi ankaŭ estas libera ?  
 — Jes !  
 — Nu, do prenu per tiu mano vian ĉapelon kaj iru for.

### Moderna

Kuracato .— Ho kiele mi povos iam recompenci vian penadon ?  
 Kuracisto .— Ho ! ne zorgu pri tio : ĉeko, kontanta mono aŭ mandato estas nepre indeferentaj.

(1) El la lasta numero de « la Spritulo », tre rekomendinda gazeto por serĉo, humoro kaj satiro. (Oni vidu la 4<sup>an</sup> paĝon de la kovrilo)

## PROBLEMOJ<sup>(1)</sup>

1 — Vortoj kreskantaj kaj malkreskantaj : Vokalo-Nomo de litero — Pli ol sufiĉe — Mordetanta besto — Filo de mia patrino — Ago — Kolekto — Metallo (radiko) — Konsonanto.

2 — Vortoj triangulaj.  
 Kiu havas filon — Kontinento — Pronomo — Nomo de litero — Vokalo.

3 — Fantaziajeto —  
 Prenu koron de alidado — kapon de iluziito — voston de pavo : Konvene miksu tiujn tri erojn : vi trovos vorton, kiun vi zorge skribos per grandliteroj. Tamen ĝi ne estas nomo de ĉiupova kreinto !

### PLANTANO.

(1) Oni sendu la solvojn antaŭ la 15a de Septembro al S<sup>ro</sup> Fr. Schoofs, sekretario de la Redakcio 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen (49, rue de la P<sup>te</sup> Ourse, Anvers). Prefere skribitajn sur poŝta karto. Oni povas ankaŭ sendi la solvojn de la antaŭe aperintaj problemoj.

En la lasta numero de la 1a jarkolekto ni publikigos la nomojn de la solvintoj. Oni povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

## DIVERSAJ INFORMOJ

La **Belga Adresaro Esperantista** estas presata!

Post kelkaj semajnoj ĝi estos acetebla.

La enhavo de nia adresaro konsistas el:

- 1<sup>o</sup> malgranda antaŭparolo;
- 2<sup>o</sup> la historio de Esperanto en Belgujo;
- 3<sup>o</sup> la regularo de la Belga Ligo Esperantista;
- 4<sup>o</sup> kelkaj vortoj pri «Belga Esperantisto»;
- 5<sup>o</sup> sciigoj pri ĉiuj belgaj ligo, grupoj, Societoj, gastotabloj, konsuloj k. t. p.;
- 6<sup>o</sup> nomaro de la belgaj esperantistoj blindaj;
- 7<sup>o</sup> ĝenerala nomaro de pli ol 3000 belgaj samideanoj;
- 8<sup>o</sup> la tutmonda Esperantista gazetara listo;

Ni esperas ke ĉiuj la belgaj amikoj subtenos tiun eldonadon mendante la adreslibron. Tiele ili iom rekompencos la gravan laboron kiun postulis la kunmetado de unua tia eldonajo. Ĉiu mendu do jam de nun la adresaron (Fr. 0.50 — Eksterlande: Fr. 0.60 — Sm. 0.24) ĉe la Centra Esperantista Belga Oficejo, Antverpeno.

**Tre Grava Sciigo.** Al la Esperantistaj farmaciistoj de la tuta mondo:

*Karaj Kunfratoj,*

Dum la Kvara Esperanta Internacia Kongreso en Dresdeno, kelkaj farmaciistoj, el diversaj landoj tie kunvenintaj, decidis starigi la Internacian Esperantistan Farmacistan Asocion (I. E. F. A.) La ĉeestintoj, kaj ankaŭ kelkaj aliaj farmaciistoj aliĝintaj dum la nuna jaro, decidis ke ĝenerala kunveno de I. E. F. A. okazos en Barcelono dum la Kvina Internacia Esperantista Kongreso.

Interkomunikinte kun S<sup>o</sup> Pujula y Vallés, la sindonema Prezidanto de la Barcelona Kongresa Komitato kaj kun S-o D-ro Ramon Bartomeu, Doktoro de Farmacio en Barcelono, ni jam povas sciigi ke la sekvantaj demandoj kaj temoj estos priparolataj dum tiu malgranda farmacia kongreso:

- A) Raporto pri la Farmacia Kunveno en Dresdeno.
- B) Esperanto kaj la Farmaciistoj (Paroladeto).
- C) Verkado de la Regularo de I. E. F. A.
- D) Pri la deklingva Esperanta Farmacia Vortareto (Komunikajo).
- E) Ĉu estas necesa, utila kaj ebla la eldono de Internacia Esperanta Farmacia Revuo? (Interdiskutado).
- F) Ĉu la Apotekoj devas esti limigitaj aŭ nelimititaj (Interdiskutado).
- G) Pri kelkaj nekunigeblaj medicinaj substancoj (Komunikajo).
- H) Pri ĝenerala reakcio de la saloj halogenidaj de fero (Komunikajo).
- I) Utileco de la naciaj formularoj, verkitaj de la Farmaciistaj Societoj, por la uniforma preparado de la kuracistaj ordonajoj kaj de la medicinaj kunmetaĵoj, kies preparado ne estas enskribita en la Oficialaj Farmakopeoj. Raporto kaj pridiskutado).

J) Ĉu Farmacio devas fariĝi scienca, ĉu komerca afero? (Interdiskutado).

Tre eble, laŭ la informoj kiujn ni ĝis nun ricevis, la «Colegio de Farmaceuticos» de Barcelono, preparos al ni oficialan akcepton. Tiu-okaze la komitato de I. E. F. A. prezentos al la «Colegio» siajn dankojn, per la diversaj naciaj lingvoj de la ĉeestantaj kunfratoj.

Ni insiste petas ĉiujn samideanajn kunfratojn kunhelpi nin, plenumante la plej eble la sekvantajn punktojn:

- A) Presigi la nunan alvokon en ĉiuj esperantistoj jurnalaj de sia lando.
- B) Presigi la nunan alvokon, en nacia lingvo tradukitan, en la diversaj farmaciaj jurnalaj de sia lando.
- D) Propagandi nian I. E. F. A. kaj Esperantan lingvon inter la kolegoj de sia lando.

D) Ĉeesti la Barcelonan kongreson kaj tieajn farmaciajn kunvenojn, aŭ sendi al la Sekretario, O. Van Schoor, Vondelstrato, 20, Antwerpen, Belgujo, antaŭ la 1<sup>a</sup> de Septembro sian aliĝon kaj se eble raportojn, sciigojn aŭ komunikajojn.

E) Enskribigi sin kaj la plej grandan eblan nombron de esperantaj farmaciistoj en la I. E. F. A. La enskribo estas senpaga. Tamen oni petas ĉiujn enskribontajn pagi ĉiujare laŭvolan kotizajon por helpi la propagandon.

Intertempe mi restas kun kora saluto,

**Oscar Van Schoor,**

*Sekretario de I. E. F. A.*

— **Alvoko al la diamantistoj!** — Laŭ la ekzemplo de aliaj samprofesianaroj, kelkaj personoj de la diamantindustrio fondis la

*Universalan Esperantan Diamantistan Asocion.*

Ĉiuj esperantistaj diamantistoj estas petataj aliĝi al tiu societo kiu celas favorigi la rilatojn inter la tutmonda diamantistaro, konigi labormetodon ĉiulande, traduki la multombrajn specialajn vortojn teknikajn de la industrio.

Se la aliĝontoj estas sufiĉombraj ni eldonos Esperantistan revuon pri la diamantindustrio.

Mi petas la diverslandajn sammetianojn tuj sendi sian aliĝon al mi, aldonante la adresojn de aliaj esperantistaj kunfratoj kiujn ili konas.

Ili ankaŭ estas petataj traduki nunan informon en nacian lingvon kaj ĝin sendi al la loka metia ĵurnalaro.

La membreco de la nova asocio estas senpaga, tamen, laŭvole ĉiu asociano povas mone helpi la progresadon de nia entrepreno.

Oni sendu ĉiujn komunikajojn al

**Marius Roe,**

*Kruger Placo, 23,  
Antwerpen.*

**Intersaĝo de geinstruistoj.** — La plej nova numero de «Internacia Pedagogia Revuo», la oficiala organo de «Internacia Asocio de instruistoj» publikigis interesan kaj tre facile realigeblan proponon de Th. Ĉejka, laŭ kiu diverslandaj geinstruistoj povas pasigi sian libertempon aŭ parton de ĝi ĉe siaj fremdaj gekolegoj, preskaŭ tute senpage, pagante nur la veturkoston tien kaj reen. La propono klare montras, kiel oni povas praktike uzi Esperanton por studi la diversajn instrusistemojn, la manieron de vivado k. t. p. en landoj, kies lingvon ni tute ne scias kaj ne bezonas scii.

Ke la propono ne nur estas pure teoria montras klare la fakto, ke jam kelkaj esperantistaj instruistoj pasigis kelkan tempon ĉe alilandaj kunfratoj.

Ni vokas la atenton de la instruistoj al tiu intersaĝo kiu povas utili ne sole al ili profesio sed ankaŭ al Esperanto.

Ni ankaŭ konsilas al ili aliĝi la «Internacian Asocion de Instruistoj» kies oficiala revuo pritraktas la plej diversajn pedagogiajn demandojn. Ni nur citas la titolon de kelkaj artikoloj de la laste aperinta numero: La novaj lernejoj, la Instruisto en Danujo, La Instruistoj en Montenegro, la Popolaj lernejoj en la norvegaj vilaĝoj, Internacia krestomatio por infanoj, k. t. p. Krom ĉi tiuj artikoloj preskaŭ la duono de la kajero estas dediĉata al pli mallongaj kaj tre interesaj notoj kaj informoj el diversaj fakoj kiuj koncernas la lernejojn aŭ instruistojn.

Oni petu informojn de S-ro Th. Ĉejka, Bystrice-Hostyn, Moravio-Aŭstrio.

— **Ekspozicio de studenta literaturo.** — Ĉe okazo de Esperanta ekspozicio, preparata tiun ĉi jaron de *I. Bohema Kongreso Esperantista*, estos elmontrita, kiel speciala sekcio, ĉio, kio rilatas la vivon studentan.

Por ke tiu ĉi entrepreno povu esti la plej brila, petas la Kongresa sekcio de «Studenta rondeto Esperantisa en Praha, Bohemujo», ke oni bonvolu sendi laŭ adreso:

*S-ro K. Kuthan, Praha II. 516, Bohemujo,* ĉion interesan, precipe ĉiuj lingvaj studentajn gazetojn kaj revuojn.

La organizantoj estas konvinkitaj, ke tia kolekto, ĝis nun la unua de tia spaco, povos efektiviĝi per kunhelpo de ĉiuj Esperantistoj el tuta mondo.



— **Propagandista Societo.** — Al ĉiuj belgaj samideanoj! Belgujo estas ĉiam antaŭe en la rangoj de la sciencoj, komerco kaj industrio. Estas ankaŭ necesa ke ĝi okupu bonan lokon en la fako de Esperanta propagando.

Se vi tion volas, tio estos!

Kun la celo propagandi Esperanton estis fondita en Huy 31<sup>an</sup> de Majo l. la « Propagandista Societo ». Tiun societeton povas aliĝi la gesamideanoj kiuj sin senpage prezentas propagandi Esperanton ĉu per paroladoj, ĉu per aliaj rimedoj.

Por ke la propaganduloj nur devu oferi sian laboron, sian bonvolon kaj iom da sia tempo la kaso de « P. S. » pagas ĉiujn elspezojn al siaj kunlaborantoj.

« P. S. » funkcias sub la aŭspicioj de la Belga Ligo Esperantista kaj ĝia prezidanto estas S-o Van der Biest-Andelhof.

Ĝi nun kalkulas 25 membrojn kaj ni petas la fervorajn esperantistojn belgajn ke ili helpu nin en nia tasko.

Ĉiuj la samideanoj povas helpi nin ĉu subtenante nian kason, ĉu aniĝante, kiel parolanto aŭ kiel propagandisto per aliaj rimedoj.

Ĉiuj informoj estos plezure sendataj de

FERNAND WAMBACQ,  
Generala Sekretario de « P. S. »  
Mont St André (Brabant).

Li ankaŭ rikoltas la aliĝojn de la novaj membroj.

La regularo estos sendata al tiuj, kiuj ĝin deziras.

**Plena Vortaro Esperanto Esperanta kaj Esperanto-franca,** unua parto, aperos en la komenco de venonta Septembro. Ĝi estas verkita de D-ro Boirac, Rektoro de la Dijona Universitato, aŭtoro de Monologio, Don Juan, Perdita kaj retrovita, la homa Radiato, k. t. p. Tiu vortaro celas prezenti ĉiujn radikvortojn troveblajn ne nur en la diversaj jam aperintaj vortaroj esperanto-naciaj, sed ankaŭ en la jam sufiĉe multaj vortaroj naciesperantaj same kiel en la teknikaj specialaj terminaroj, eĉ en la verkoj de la plej aŭtoritataj literaturistoj. Pri ĉiu grava vortradiko oni provis montri la devenon kaj veran signifon: pri kelkaj el ili la unuan proponinton, kaj ankaŭ taksis, sed laŭ persono opinio, la valoron. Apud multaj oni aldonis serion de ĉefaj devenantaj vortoj. Tiu unua parto entenas la literojn A kaj sekvantajn ĝis L. La dua kaj fina parto, kiu estos baldaŭ en presado, aperos antaŭ la fino de Decembro. La tuta libro, zorge presita sur trikolonaj paĝoj de formata in-16, estos la plej kompleta repertuaro ĝis nun eldonita, de la lingvo Esperanto. Prezo de la unua parto: 4 frankoj. — Oni povas de nun mendi skribante al la eldonisto S-ro Darantiere, presisto, rue Chabet-Charny, 65, Dijon, (Côte d'Or) Francujo.

« **The Northern Institute.** » — *Internacia Komerca Instituto* en Leeds (Anglujo), kiu envahas 300 lernantojn kaj kies direktoro estas S-ro A. C. Poiré, Vic-Konsulo de Francujo, metis Esperanton en sian tempotabelon antaŭ tri jaroj. Ĝi nun ĵus fondis specialan sekcion por alilanduloj kiuj deziras lerni krom la anglan lingvon, la anglajn komercajn metodojn. La instruado estas farata per la Esperanta lingvo kaj kvin specialaj profesoroj donas lecionojn ĉiutage kaj tiu speciala sekcio bonege progresas.

Oni petu informojn de S<sup>o</sup> A. C. Poiré, Vic-Konsulo de Francujo, Leeds.

#### Deziras korespondi:

E. Alec, 98, Elm Str., Burnley, (Britujo).

Hyman Finebloom, Wip Str. 8, Antwerpen.

Zinner Sandor, Studento, Satoraljaújhely (Hungarujo).

Karel Nisser, Studento, jungmanova tr. ĉ. 14, Praha II.

Jos. Tscherpel, Studento, Slupi 10, Praha II.

Miroslav Slégr, Studento, Bojisk ĉ. 10, posil 4, Praha II.

F-ino Julie Supichova, Instruistino, Cervený Kostelec, Bohemujo.

**Asekurado:** S<sup>o</sup> Edouard Bernard de Kompanio le Nord petas pri adreso de persono — prefere asekuragento — kiu kapablas sin okupi pri fajrasekurado.

## Letero de Mgr. Giambene,

Presita en Itala « Notizie Esperantiste »

Pro mia eksigo el la agema propagando de Esperanto, disvastigis inter la Esperantistoj kaj inter iliaj malamikoj la famo, ke mi estas forlasinta Esperanton por klopodi pri ia lingva projekto.

Sed mi deklaras, ke nur miaj propraj okupadoj malhelpas mian daŭrigan agadon por la disvastigado de Esperanto, kaj tion mi tre bedaŭras, ĉar mi estas ĉiam *Esperantisto konvinkita*, kaj tiel mi restos, ĝis kiam mi scios, ke alia sistemo estas pli disvastigita, ol la sistemo de Zamenhof.

Kiel pruvoj pri mia fideleco al Esperanto, mi rimarkigas mian kunlaboradon sukcesplenan por reorganizi la Roman Esperantistan Societon « Imperiosa Civitas, » kies mi estas ĉiam ano; ankaŭ mian promeson daŭrigi en la proksima akademica jaro miajn konferencojn pri Esperanto; kaj fine originalan verkon en la lingvo Esperanto, kiu baldaŭ elpresigos.

Kun estimo,

MONSINJORO LUIGI PROF. GIAMBENE.

## BELGA KRONIKO (1)

**BRUSELO.** — **Universala ekspozicio de Bruselo dum 1909.** — La Belga Registaro preparas, por 1910, Grandan Universalan Ekspozicion en Bruselo. En tiu Ekspozicio, speciala sekcio, pri kiu zorgas la Belga Registaro mem, estos difinita por la grandaj internaciaj asocioj kaj institucioj.

Post klopodoj faritaj de Sinjoro Generalo Sebert, je la nomo de la Esperantista Centra Oficejo, sekretario de la oficialaj institucioj de Esperanto, la Belga Registaro akceptis, ke la lingvo Esperanto estu prezentata, en tiu speciala sekcio de la Ekspozicio de Bruselo, kiel reprezentanto de la lingvo internacia.

Tiu prezentado de nia lingvo montros ĉiujn verkojn kaj publikajojn pri la instruado kaj propagando de Esperanto en ĉiuj landoj, kaj sciigojn historiajn kaj statistikajn pri la progresoj de nia afero, pri ĝia nuna stato, pri la servoj faritaj de nia lingvo kaj ĝiaj diversaj aplikoj.

**ANTVERPENO.** — La 24 an de Junio, S-ro K. Weyler, direktoro de la Urba Instituto N-ro 2, faris tre sukcesintan paroladon pri Esperanto antaŭ S-ro D-ro V. Desguin, Skabeno de la Publika Instruado kaj la perfektiga konsilantaro de la unuagrada Instruado. La parolinto proponis enkonduki Esperanton en la superajn klasojn de la Urbaj Institutoj (lernejoj por pagantaj lernantoj) kaj lia propono ricevis tiasence bonan akcepton, ke ĝi estis sendata al speciala komisio.

Ni sciigas ke tiu ĉi komisio favore raportis pri la propono de S-ro Weyler, kaj unuvoĉe decidis ĝin apogi ĉe la Urbestraro.

Tiu ĉi fakto ankoraŭ solvas la demandon, sed ĝi pruvas kiom la Antverpena instruistaro sin interesas pri nia kara lingvo. Ni esperu ke iliaj klopodoj sukcesos, kaj ke baldaŭ ni povos saluti la Antverpenan urbestraron kiel la unuan, kiu enkondukis Esperanton en la publikan instruadon.

**Antverpena Grupo Esperantista.** — La 10 an de Julio tiu ĉi vigla societo organizis intiman feston por gratuli siajn membrojn, kiuj dum la lasta ekzameno akiris la ateston pri profesora kapableco nome: F-inoj Berten, Casie kaj de Jaegher; S-oj de Keyser, Jacobs kaj Schumacher, Multnombraj samideanoj ĉeestis tiun festan kunvenon, ĝojigitan de kantoj kaj deklamoj.

(1) La grupo estas petataj sendi siajn informojn al la subskribinta raportanto, plej malfrue antaŭ la 5a de ĉiu monato, kaj ankaŭ la ĵurnalojn de sia urbo aŭ regiono, enhavantajn artikolojn pri Esperanto. Adreso: **Vondelstraat, 20, Antwerpen.**

— La 21 an de la sama monato dudeko da membroj de P.A. G. E. vizitis en Bergerhout la diamantpolurejon de S-ro J. Roe, patro de S-ro Marius Roe, prezidanto de la tiea grupo «Laboro». La posedanto, kiu afable estis invitinta la Antverpenajn samidcanojn, akceptis ilin unue en sia hejmo, kie li klarigis al ili la diversajn prilaboradojn de la kruda diamanto kaj montris al ili grandvalorajn kaj belegajn specimenojn. En la polurejo mem, ili vidis la diamantlaboristojn en plena aktiveco, dum S-roj Roe, patro kaj filo, komprenigis la interskvajn fazojn alprenitajn de la diamanto, de ĝia nelaborita stato ĝis ĝia aliĝo en rozo, brilanto, ke.

S-roj Roe havis la ĝentilan afablecon ornamigi la enirpordon de la laborejo per esperanta bonvena devizo, kaj per kvinpintaj verdaj steloj la muelilojn de la poluristoj.

Post la vizito de la fabrikejo, S-roj Roe rekondukis la esperantistojn en sia hejmo, kie, trinkante la vinon de l'amikeco, S-ro Van Schoor, dankis la amindan gastiganton kaj esprimis tutkorajn bondezirojn por la prosperado de la firmo Roe, kaj S-ro Van der Biest elparolis toston al S-ro Marius Roe, kaj al la novfondita esperantista grupo «Laboro».

**La Verda Stelo.** — Kun bona rezultato la someraj kursoj finiĝis: la perfranca (Prof. J. B. Istace) la 20 an de Julio; la perflandra (Prof. : Frans Schoofs) la 29an de Julio.

La kunvenoj de «La Verda Stelo» okazas ĉiun merkredon je la 8 1/2<sup>a</sup> vespere en la aparta salono de «Zomerhof» 32 Dageraadplaats (32, Place de l'Aurore). Ĉiumerkrede je sama horo libroj de la biblioteko estas haveblaj.

**Suda Lumo.** — La sidejo de tiu societo estas de nun en la «Distillerie du Cirque», Leopold de Wael Placo, 36, kie ankaŭ okazas ĉiujarde la kurso.

